Tertuliano

# Al la Martiroj

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling 1982

## *Gazete:*

en *Dia Regno*, januaro ĝis marto 1982

## *Broŝure:*

Tertuliano
Kuraĝigo por la Martiroj
El la latina trad. Gerrit Berveling
Voĉoj Kristanaj 12
VoKo, Vlaardingen 1986

## *Interrete:*

*La originala latina teksto:*

http://www.hs-augsburg.de/~harsch/Chronologia/Lspost03/Tertullianus/ter_mart.html

http://www.tertullian.org/latin/ad_martyres.htm

https://books.google.de/books?id=4p1SAAAAcAAJ&pg=PA2&lpg=PA2&dq=%22

*Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-02*

*Ĉar martireco tiom gravis en la juna kristanismo, ne estas mirige, ke ankaŭ kiel aŭtoro Tertuliano havis ion kontribui. Unue, jam en Antologio Latina 4 oni povas legi la Pasiono de Feliĉita kaj Perpetua. Laŭ pleja verŝajneco redaktis tiun tekston Tertuliano, kiu en tiu epoko estis sub certa influo de Montanismo.*

*Krom tio unu el liaj fruaj traktaĵoj, kiun ni prezentas tutaĵe, estas malferma letero al kaptitaj kristanoj de loka komunumo:*

## *Al la Martiroj*[1]

## *Ad Martyras*

**1:**1 Inter la nutraĵoj de la karno, ho vi benataj martiroj enoficigotaj, kiujn al vi ne nur S-ino Panjo Eklezio el siaj brustoj sed ankaŭ unuopaj fratoj el siaj propraĵoj havigas en la karceron, akceptu ankaŭ ion de ni, kio celu al la eduko de la spirito. Ke la karno estus sata, dum la spirito malsatus, ja ne konvenus …

Eĉ plie: se, kio malfortas, estas zorgata, – same kio ankoraŭ pli malfortas, ne devas esti neglektata. Ne, ke *mi* estas tiel grava, ke mi vin alparolu. Sed ankaŭ la plej trejnitajn gladiatorojn ne nur iliaj estroj kaj gvidantoj, sed eĉ simpluloj kaj ajnaj nenifaruloj defore instigadas: tiel, ke ofte sugestoj faritaj de la popolo montriĝis utilaj.

2 Unue do, benataj, ne dolorigu la sanktan Spiriton, kiu kune kun vi enpaŝis en la karceron.

---

1 Aperis unue en *Dia Regno*, januaro ĝis marto 1982, poste ĉe VoKo, sub la titolo *Kuraĝigo por la Martiroj*.

Se tiu ja ne kun vi estus enirinta, ankaŭ vi tie hodiaŭ ne troviĝus. Kaj tial strebu, ke tie ĉe vi li restu, ke tiel vin li konduku al la Sinjoro. Domo de la diablo estas la karcero, kie sian sklavaron li kuntenas; sed tiacele vi venis en la karceron, por ke lin eĉ en lia propra domo vi surtretu. Ĉar ekstere jam batalinte lin, vi tie jam lin surtretis. 3 Do li ne diru: Ili estas nun sur tereno mia, mi do elprovos ilin per ĉipaj malamoj, per apostatiĝoj aŭ reciprokaj interkvereladoj. Fuĝu li vidi vin, kaj en la siaĵon plejinternan li sin kaŝu, frakasita kaj rigida, kvazaŭ serpentaĉo sorĉita aŭ elfumigita. Kaj por li ne estu tiel agrable en lia regno, ke li kuraĝu ataki vin: sed li trovu vin kirasitaj kaj armitaj per konkordo, ĉar via paco estas lia milito. Tiun pacon ne havante en la eklezio, kelkaj ekkutimis peti ĝin de la martiroj enkarceraj[2]. Kaj tial vi – ankaŭ tiucele – devas havi ĝin en vi kaj dorloti kaj ŝirmi ĝin, por ke, se necese, ankaŭ al aliaj vi povu liveri ĝin.

**2:**1 La ceteraj ŝarĝoj de la animo certe vin akompanis ĝis la sojlo de la karcero, ĝis kie ankaŭ <akompanis vin> viaj parencoj. Depost tiam vi estas disigitaj de la mondo. Se vi ja pripensus, ke fakte la mondo mem estas karcero, vi komprenos, ke pliĝustadire vi eliris el la karcero ol en karceron eniris. Pli grandajn tenebrojn havas la mondo, kiuj blindigas la korojn de la homoj. Pli pezajn ĉenojn surmetas la mondo, kiuj perfortas la animojn mem de la homoj. Pli aĉajn malpuraĵojn elspiras la mondo: la voluptojn de la homoj. Pli multajn, fine, krimulojn enhavas la mondo, nome la tutan homan genton. Juĝojn ja ne de la vickonsulo, sed de Dio ĝi atendas. Kaj el *tiu* karcero, ho benataj! vi kredu vin transportitaj en iaspecan konservejon.

2 Ĝi enhavas tenebrojn, sed lumo estas vi. Ĝi havas ĉenojn, sed vi estas liberaj por Dio. Aĉe tie odoras, sed vi estas odoro de agrableco. La juĝiston tie oni atendas, sed vi estas juĝontaj pri la juĝistoj mem. Kiu aspiras la fruktojn de ĉi mondo – tiu tie tristiĝu!

---

[2] Post problemoj kun loka eklezio, foje kristanoj petis la intervenon de enkarceraj martiroj por reestabli la eklezian pacon. Ofte temis pri tio, ke pro timo antaŭ martiriĝo iuj malkonfesis la religion, sekve estis elpuŝitaj el la eklezia unueco, kaj nur de la martiroj (kiuj ja bone konsciis kiel streta estas ofte la limo inter kuraĝa konfeso kaj timplena malkonfeso) ili ricevis plenan pardonon – kaj repaciĝon kun la eklezio.

Kristano eĉ ekster la karcero rezignis pri ĉi tempo; kaj *en* la karcero – eĉ *pri* la karcero … Neniel ja gravas, kie vi estas en ĉi tempo, ĉar vi estas ekster ĉi tempo! Kvankam vi perdis kelkajn el la ĝojoj de la vivo, estas bona negoco iom perdi por gajni pli.

Kaj mi ankoraŭ nenion diris pri la premio, al kiu Dio invitas la martirojn.

3 Pormomente ni komparu la vivmanieron de ĉi tempo kaj tiun de la karcero. Ĉu la spirito ne gajnas pli en la karcero, ol tie perdas la karno? Eĉ plie: kio estas justa – la karno ĝin ne perdas pro la zorgo de la eklezio kaj la *agape*[3] de la fratoj; kaj krome, kio ĉiam estas utila por la fido, tion la spirito akiras. Ne vidas vi aliulajn Diojn, bildojn vi ne publike renkontadas, festotagojn de la nacianoj[4] vi ne per via intervivado mem partoprenas, de gras-odoroj fiegaj[5] vi ne estas skurĝataj, de kriadoj de spektaĵoj, de kruelo aŭ furiozo aŭ senĉasto de festantoj vi ne estas tuŝataj; viaj okuloj ne tiriĝas al lokoj de publika lascivo; ripozas vi de skandaloj, de elprovoj, de malbonaj memoroj, ja eĉ de persekuto. Tion ĉi liveras karcero al kristano, kion dezerto al profeto. Mem la Sinjoro en la dezerto plurfoje pasigis la tempon por preĝi pli libere, por el ĉi tempo iom foriri. Sian gloron, fine, li demonstris al siaj disĉiploj ankaŭ en dezerto.

4 For do la nomo «karcero»: izoliĝo ni ĝin nomu.

Kvankam la korpo estas enfermita, kvankam la karno estas tenata, ĉio estas malferma por la spirito. Vagadu do spirite, promenu spirite, kaj ne stadiojn senlumajn aŭ volbaĵojn longajn vi proponos al vi mem, sed tiun vojon, kiu kondukas al la Sinjoro.

---

3 Sekvas pluraj kursivaj vortoj, Greke en la originalo, precipe pri sporto: jen iliaj tradukoj: en 2:3 amo aŭ eŭĥaristio; en 3:2 sporta konkurso, sportjuĝisto, trejnisto, sporta premio, gvidanto, luktejo; en 4:3 travipado aŭ flagelado. – Same kiel nuntempe oni ofte uzas Anglajn esprimojn por sportaj aferoj, tielsame tiutempe oni prenis Grekajn vortojn en Latina teksto kvazaŭ fakterminojn de la sporto.

4 = paganoj.

5 Pro la buĉoferoj en la temploj.

Kiomfoje vi ja marŝos, tiomfoje vi ne plu estos enkarcere. Nenion sentas la osto en la medolo, kiam la animo estas en la ĉielo. La tutan homon la animo kuntiras kaj kien ĝi volas, transigas. Kie ja estas via koro, tie estas ankaŭ via trezoro. Tie do estu nia koro, kie ni deziras havi trezoron.

**3:**1 Nu do, ho benatoj, ankaŭ por kristanoj karcero estas ĝena! Sed ni estas vokitaj por militi por la Viva Dio, jam tiutempe, kiam ni jese respondis al la paroloj de la sakramentoĵuro[6]. Neniu militisto venas al batalo kun siaj delicoj, nek paŝas rekte el sia dormoĉambro[7] en la batalon, sed el soldattendoj leĝeraj kaj disetenditaj, kie loĝas ĉia dureco, malbono kaj senagrableco. Eĉ dumpace, pere de penado kaj senkomfortaĵoj, ili jam lernas toleri militon, plenarmite marŝante, trakurante la kampojn, fosaĵojn farante, kunigante ŝildotegmentojn. El ŝvito konsistas ĉio, por ke iliaj korpoj kaj animoj ne ektimu. El la ombro en la sunon, el la suno en la ombron, el la tuniko en la kirason, el la silento al kriado, el kvieto al tumulto …

2 Simile, ho benatoj, – kio ajn estas tiu ĉi kruelaĵo, konsideru ĝin ekzerco de la virtoj de l' animo kaj de l' korpo. La bonan *agon* vi eniros, en kiu la *agonothetes* estas la Viva Dio, la *xystarches* la sankta Spirito, la krono de l' eterneco la *brabeum*, la civitaneco de la anĝela realo en la ĉieloj estas la gloro en jarcentojn da jarcentoj. Do via *epistates*, Jesuo Kristo, kiu spirite sanktoleis vin kaj kondukis vin al tiu ĉi *scamma*, deziris teni vin rezervisto antaŭ la tago de la *agon* por pli dura traktado anstataŭ pli libera situacio, por ke fortikiĝu en vi la fortoj.

3 Same ankaŭ la atletoj estas apartigitaj por pli strikta disciplino, por ke ili havu tempon por konstrui sian forton: ili estas for-tenataj de luksaĵoj, de manĝaĵoj plej delikataj, de drinkado pli ĝojiga. Ili estas sub devigoj, estas elĉerpataj, estas lacigataj. Ju pli ili ŝvitegis ĉe siaj ekzerciĝoj, des pli ili atendas la venkon. Kaj tiuj – diras la Apostolo – por akiri kronon pereeman … Sed ni, akironte kronon eternan, – ni interpretu ĉi karceron kiel luktejon, por ke ni estu kondukataj al la kurejo de la tribunalo bone

6 = bapto.

7 = am-nesto.

trejnitaj je ĉiuj malagrablaĵoj; ĉar virto estas konstruata per malmoleco, per moleco malkonstruata.

**4:**1 Ni scias el la instruo de la Sinjoro, ke malfortas la karno, sed la spirito pretas. Do ni ne trompu nin mem, ĉar la Sinjoro diris, ke la karno malfortas. Tial ja li asertis, ke la spirito pretas, por montri kio devas obei al kio, nome ke la karno servu al la spirito, la malpli forta al la forta, por ke ankaŭ ĝi mem ricevu fortecon el la alia.

La spirito interparolu kun la karno pri la komuna savo, – ne plu pri la ĝenoj de la karcero, sed pri la *agon* mem kaj pri la batalo pensante.

Timos eble la karno la pezan glavon kaj la altan krucon kaj la furiozon de bestioj kaj la finfinan punon per fajro kaj tutan ĉi inĝeniecon de la torturisto ĉe la turmentado. Sed la spirito, kontraŭe, certigu, ke tio ĉi (ja agaca por ĝi mem kaj por la karno) tamen de multaj estis egalanime akceptita, ja eĉ propriniciate serĉita – pro famo kaj gloro –, kaj ne nur de viroj, sed ankaŭ de virinoj, por ke ankaŭ vi, ho benatinoj, respondu vian sekson.

2 Longe daŭrus, se mi elnombru la unuopulojn, kiuj per la glavo sin mortigis, instigite de sia animo. Elinter la virinoj ĉe-mana estas Lukrecia, kiu – seksperfortita – tranĉilon metis en sin mem, fronte al siaj parencoj, por akiri gloron al sia ĉasteco. Mucio[8] bruligis sian dekstran manon sur altaro – por ke famiĝu ĉi ago. Ĉu malpli faris la filozofoj? Heraklito kiu sin – ŝmiritan per bova sterko – forbruligis; same Empedoklo, kiu saltis en la flamojn de la monto Etna; kaj Peregrino, kiu antaŭ nelonge metis sin sur brulŝtiparon, dum ankaŭ virinoj la fajron malestimis: Didona, kiam post edzo ege amata ŝi estis devigita al reedziniĝo; same la edzino de Hasdrubal, kiu, kiam Kartago jam brulis, por ne devi vidi sian edzon kiel peteganton de Skipiono, kune kun siaj infanoj sin ĵetis en la forbrulon de la patrujo. La Romia generalo Regulo, kaptite de la Kartaganoj, ne volante ke li sola estu kompenso por multaj militkaptitaj Kartaganoj, preferis esti redonita al la malamikoj kaj, enŝtopita en specon de kesto, li suferis tiom da doloroj, kiom da najloj traboris lin de ĉiuj

---

[8] Vidu en *Apologio* 50.

flankoj. Bestiojn certa virino propriniciate aliris kaj serpentaĉojn multe pli timindajn ol taŭro kaj urso: tiajn Kleopatra sendis sur sin mem, por ne fali en la manojn de la malamikoj.

3 Sed timo pro la morto ne estas tiel granda kiel timo pro turmentoj. Do, ĉu cedis al torturisto la Atena meretrico? – kiam pro kunscio pri konspiro ŝi estis torturata de tirano kaj ne perfidis la konspirantojn kaj finfine eĉ sian langon formordita sputis al la tirano en la vizaĝon, por ke ili sciu, ke iliaj torturoj nenion efikas, eĉ se ili ankoraŭ plu daŭrigus? Ĉar kio hodiaŭ ĉe la Spartanoj estas festo tre populara: la *diamastigosis*, t.e. la travipado, tio estas konata. En tiu festo antaŭ la altaro estas vipataj precipe nobelaj junuloj, dum iliaj gepatroj kaj parencoj ĉeestas kaj instigas, ke ili eltenu. Ornamo ja kaj gloro estas apogee akiratаj, se prefere la animo ol la korpo cedas pro ĉi batoj.

Nu, se pro tera gloro per forteco de korpo kaj animo tiom licas, ke glavon, fajron, krucon, bestiojn, turmentojn oni malŝatas pro la premio de laŭdo homa, tiam mi povas diri: Etaj estas tiuj suferoj por akiri la gloron ĉielan kaj la Dian rekompencon. Ĉu vitro tiom valoras kiom vera perlo? Kiu do ne volontege elspezus tiom por la vera, kiom aliaj por la falsa?

**5:**1 Mi flankelasas la motivon de gloro. Ĉiujn ĉi batalojn de kruelo kaj sufero ĉe homoj jam primokis nura pasio kaj certa mensmalsano. Kiom da nenifaruloj metis la pasio por armiloj antaŭ la glavon? Certe al bestioj eĉ ili descendas pro pasio, kaj pro mordoj kaj cikatroj ili kredas sin pli belaj. Ankaŭ jam kelkaj sin transdonis al flamoj, tiel ke certan tempon ili pasigis en brulanta tuniko. Aliaj marŝis inter la bovovipoj de la bestobatalantoj kun ŝultroj plej paciencaj.

Tion ĉi, ho benatoj, Dio ne senkaŭze toleras en ĉi tempo, sed por instigi nin ankaŭ tiam kaj eĉ tiutage hontigi nin, kiam ni fortimiĝus suferi tion pro la vero (por nia saviĝo), kion aliaj pasie plenumis pro vaneco, je sia pereo.

**6:**1 Sed tiujn ĉi ekzemplojn de firmeco ni preteras, kiuj fontas el pasio. Ni turnu nin al la konsidero de la homa kondiĉo ĝenerale, por ke, se ion ni devos kuraĝe alfronti, antaŭ tio instruu nin, kio kutimas okazi al ni

kontraŭ nia volo. Kiomfoje ja bruloj cindrigis homojn! Kiomfoje ne nur en la arbaroj, sed ankaŭ meze de la Urbo bestioj – eskapintaj el siaj kaĝoj – homojn voris! Kiom da homoj estis murditaj de rabistoj per ŝtalo, de malamikoj ankaŭ per kruco, estante unue torturitaj, ja eĉ priverŝitaj de ĉia malhonorigo! Ĉiu ja povas suferi pro iu homo, kion li dubas suferi pro la afero de Dio!

Pri tio ĉi ja nia nuntempo estu bela pruvo: Kiaj kaj kiel gravaj personoj trovas vivofinon – pro iu homo[9]! –, pri kiuj tion oni ne atendus ĉe tiaj deveno, altrango, korpa forteco aŭ aĝo! – Aŭ per lia mano, se ion ili faris kontraŭ li; aŭ pere de liaj malamikoj, se ili lin defendis …

---

[9] Nome pro imperatoro strebanta fariĝi imperiestro. Ekzemple inter la jaroj 188 kaj 197: Pertinakso, Didio Juliano, Cincio Severo, Peskenio Nigra, Vespronio Kandido, Albino, Septimio Severo …